

# Esperanto 255

## aktuell

38. Jahr (2019), №3 (255)



Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



- Loka tribunalejo, kulturmonumento de Neumünsterr
- Zsófia Kóródy en konferenco por lingvotestantoj ● Sankta Meso en Esperanto por Paco kaj Justeco en Vieno ● Sunplena kaj bonetosa 35-a PSI ● 10 jaroj de Zamenhofparko ● 15-a BIERo – Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo ● Aliĝilo al la 41-a BAVELO-Seminario

## Deutscher Esperanto-Bund e.V.

### Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B  
[www.esperanto.de/deb](http://www.esperanto.de/deb) (Netzpräsenz)

**Bankkonto** (por membrokotizoj kaj donacoj) /

**Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge

und Spenden): HELADEF IERB,

Sparkasse Odenwaldkreis,

DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den

D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

### Oficejo / Geschäftsstelle:

#### Esperanto-Laden

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: *Sibylle Bauer*

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

[sibylle.bauer@esperanto.de](mailto:sibylle.bauer@esperanto.de)

#### Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

### Estraro GEA / Vorstand DEB

**Netzpost** an / retmesaĝo al [gea.fe@esperanto.de](mailto:gea.fe@esperanto.de)

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form [vorname.name@esperanto.de](mailto:vorname.name@esperanto.de).

#### Prezidanto / Vorsitzender

*Ulrich Brandenburg*, Durchwahl: -5111

[gea.prezidanto@esperanto.de](mailto:gea.prezidanto@esperanto.de)

#### Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

*Andreas Emmerich*, Durchwahl: -5112

#### Trezoristo / Kassenwart

*D-ro Matthias Hecking*, Durchwahl: -5113

#### Landaj ligoj / Landesverbände

*Wolfgang Bohr*, Durchwahl: -5114

#### Administrado / Verwaltung

*Barbara Brandenburg*

#### Publika agado kaj pliklerigado /

#### Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung

*Oliver Walz*, Durchwahl: -5116

#### IT-aferoj (redakcio) / IT-Fragen

(redaktionell)

*Julia Noe*, Durchwahl: -5117

#### Kongresoj kaj renkontiĝoj / Kongresse und Treffen

*Andreas Diemel*

#### IT-aferoj (teknikaj) / IT-Fragen (technisch)

*Franz Kruse*

#### Jugendvertreterin / GEJ-komisiito

*Cornelia Luszczek*, Durchwahl: -5118

## Germana Esperanto-Junularo /

### Deutsche Esperanto-Jugend

*Michaela Stegmaier*, Durchwahl: -5121

[gej.prezidanto@esperanto.de](mailto:gej.prezidanto@esperanto.de)

#### Komisiitoj / Beauftragte

[esperanto.de/deb/beauftragte](http://esperanto.de/deb/beauftragte)

#### Verantwortliche für Presse- und

#### Öffentlichkeitsarbeit

*Louis von Wunsch-Rolshoven*,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

[louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de](mailto:louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de)

*D-ro/Dr. Rainer Kurz*, Plettenbergstr. 19,

70186 Stuttgart, 0163-3873785,

[rainer.kurz@esperanto.de](mailto:rainer.kurz@esperanto.de)

#### Komisiito por rondvojaĝoj / Verantwortlicher für Rundreisen

*Uli Ender*, [uli.ender@esperanto.de](mailto:uli.ender@esperanto.de)

#### Medienecho

*Hermann Kroppenber*, Durchwahl: -5121

[medienecho@esperanto.de](mailto:medienecho@esperanto.de)

#### Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. *Wolfgang Schwanz*,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, [buchversand@esperanto.de](mailto:buchversand@esperanto.de), [www.esperanto.de/buchversand](http://www.esperanto.de/buchversand)

*esperanto.de/buchversand*

#### Kontaktadresoj / Kontaktadressen

*Julia Noe*, Bergiselstraße 3, 79111 Freiburg

#### Pliaj adresoj / Weitere Adressen

#### Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

#### Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

[www.esperanto.de/gej](http://www.esperanto.de/gej) (Netzpräsenz)

#### Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

#### Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: *Zsófia Kóródy*

(instruado), *Peter Zilvar* (klerigado kaj

kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg,

die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521)

1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

[ich@esperanto.de](mailto:ich@esperanto.de), [www.esperanto.de/ich](http://www.esperanto.de/ich)

#### Germana Esperanto-Instituto /

#### Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. *Martin Haase*, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), [martin.haase@esperanto.de](mailto:martin.haase@esperanto.de),

[www.esperanto.de/dei](http://www.esperanto.de/dei)

#### Germana Esperanto-Biblioteko /

#### Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. *Karl Heinz Schaeffer*, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

[biblioteko@esperanto-aalen.de](mailto:biblioteko@esperanto-aalen.de)

[bibliothek-aalen@esperanto.de](mailto:bibliothek-aalen@esperanto.de)

[www.esperanto.de/bibliothek](http://www.esperanto.de/bibliothek)

#### Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

*Andreas Emmerich*, [estraro@fame-stiftung.de](mailto:estraro@fame-stiftung.de)

(nur por FAME)

#### Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, [stiftungmondo@gmail.com](mailto:stiftungmondo@gmail.com),

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart

eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

## Aŭstria Esperanto-Federacio /

### Österreichischer Esperanto-Verband

[aej@esperanto.at](mailto:aej@esperanto.at), [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at)

#### Aŭstria Esperanto-Junularo /

#### Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

[aej@esperanto.at](mailto:aej@esperanto.at), <http://aej.esperanto.at>

#### Esperantomuzeo Vieno /

#### Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift:

Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz

1, Postfach 25, 1015 Wien, [plansprachen@onb.ac.at](mailto:plansprachen@onb.ac.at), [www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)

[www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)

#### UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

#### Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. *Wolfgang Schwanz*, Adressen

siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

#### Aŭstrio / Österreich

*Leopold Patek*, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel.

+43/66473611289,

[aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at)

#### Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

#### Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

#### Redaktista teamo / Redaktion:

*Stano Marček* (Martin/Slovakio),

*Yashovardhan Singh*, Im Johannistal 23, 42119

Wuppertal. Durchwahl: -541

#### Kunlaborantoj / feste Beiträger:

*Uwe Stecher* (Österreich, El la mondo),

*Hermann Kroppenber* (Medienecho),

*Utho Maier* (Bibliothek), *Peter Zilvar* (ICH)

#### Presejo / Druck

Alfaprint, Martin, Slovakio

*Esperanto aktuel* kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

*Esperanto aktuel* mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

#### Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: [deb@esperanto.de](mailto:deb@esperanto.de)

#### Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato \*.doc

a.s.) al [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), por n-ro 2019/3 ĝis

la 15-a de majo 2019. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al *Yashovardhan Singh* (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im

Format \*.doc o.ä.) an [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de),

für Nr. 2019/3 bis zum 15. Maj 2019.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an *Yashovardhan* (s.o.).



## Karaj legantoj,

antaŭ unu jaro mi kun kelkaj geamikoj ĉeestis la entombigon de Hans-Dieter Platz en vilaĝo apud Kassel. Multaj el vi konis lin, multaj kutimis partopreni en la jarfinaj "Internaciaj Festivaloj" (IF). Kvankam tio ne estis lia profesio, li estis la plej profesieca organizanto de Esperanto-renkontiĝoj, kiun mi iam renkontis. Dum jaroj la IF-oj donis eblecon ankaŭ al esperantistoj el "nepagipovaj landoj" (tiu esprimo en la pasinteco ĉefe rilatis al orienteŭropanoj) veni kaj dum unu semajno ĝui internacian etoson. Kelkaj el ili helpis en la "knajpo" aŭ kontribuis al la programo. Alian parton kovris la "IF-fonduso", kiun HDP estis kreinta kaj al kiu ĉiu povis kontribui.

La terminon "nepagipova" oni hodiaŭ nur ankoraŭ en esceptaj okazoj povas apliki al partoprenantoj el orienta Eŭropo. Sed lastatempe ankaŭ niaj renkontiĝoj fariĝis pli tutmondaj. Ŝatus veni kaj kontribui ankaŭ personoj el landoj, kies Esperanto-movado estas tute nova. Ilin ofte malhelpas la altaj vojaĝ- kaj restadkostoj. Por plenkreskulaj renkontiĝoj kutime ne estas riceveblaj subvencioj el publikaj fontoj. La financaj rimedoj de niaj Esperanto-asocioj estas tre limigitaj. Kaj ni ankaŭ ne povas ŝarĝi la buĝetojn de niaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj per pli altaj elspezoj ol hodiaŭ, ĉar ilin finansas la ordinara partoprenantoj per siaj kotizoj jam sufiĉe altaj.

La estraro de GEA kune kun la FAME-fondaĵo decidis krei "Fonduson HDP" memore al Hans-Dieter Platz. Ĝi funkcios sub la tegmento de la FAME-fondaĵo por ne miksiĝi kun la ordinara GEA-buĝeto (GEA siavice restarigis buĝetlinion por subvencio de prelegvojaĝoj, kiu direktiĝas al la sama celgrupo). Al la

"Fonduso HDP" vi povas kontribui per mondonacoj al FAME-Stiftung, kiuj estas imposte subtraheblaj. Kontribuoj kun la distingo "Fonduso HDP" estas ekskluzive destinitaj por ebligi al esperantistoj kun limigitaj financaj ebloj partoprenon en niaj renkontiĝoj. Ilin administros FAME-Stiftung en trarivebla maniero. Kiu donacas al la fonduso, siavice povas proponi ricevantojn. La kapitalo tiamaniere akirita ne estos submetita al la reguloj de jara buĝeto, sed (se ne foruzita jarfine) restos sur la konto por la sama celo.

Jam nun ni rekomencis la tradicion de prelegvojaĝoj. Dum mi skribas ĉi tiun leteron, ĉe ni gastas Aleksandro Melnikov, profesoro el Rostov/Don bone konata inter esperantistoj. Dum pluraj semajnoj li nun vojaĝas de unu grupo al alia, prelegas kaj rakontas pri jardeko da spertoj en lando, kiu transformiĝis kiel malmultaj aliaj. Lia vojaĝo eĉ estas ripeto: jam antaŭ tridek jaroj li foje gastis en Germanio kun simila programo. Pluraj el vi povis renkonti la konatan Esperanto-aktivulon Francois Hounsounou el Benino, kiu ĉeestis la paskan renkontiĝon PSI kaj vizitis esperantistojn en suda Germanio. Pliaj prelegvojaĝoj sekvos. Mia impresio estas, ke ili ne nur helpas aktivigi la vivon de niaj grupoj. Faras diferencon ankaŭ la ebleco senpere ricevi impresojn kaj prijuĝojn el partoj de la mondo, pri kiuj kutime informas nin nur la amasmedioj. Organizati tiajn vojaĝojn faras multe da laboro. Ĝi postulas kapablon plani kaj kontakti. Multan dankon al Uli Ender, kiu lastatempe transprenis tiun oficon kaj jam pruvus rimarkindan improvizan talenton!

La eldona ritmo de *Esperanto aktuell* kaŭzas ke mi skribas ĉi tiun leteron meze de majo, sed la respektiva numero aperos nur iam en junio, do post la Germana Esperanto-Kongreso en Neumünster. Por ĝi multajn aferojn ankoraŭ necesas prepari. La kondiĉoj estas nemalbonaj, kaj mi esperas ke la partoprenantoj ĝuos altnivelan kaj bone organizitan kongreson. Intertempe ni ankaŭ jam estas preparantaj la sekvan kongreson dum pentekosto 2020. Ĝin ni okazigos komune kun la Pola Esperanto-Asocio kaj la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio de la 29-a de majo ĝis la 1-a de junio en Frankfurt (Oder) kaj Slubice, do ambaŭflanke de la rivero. Ambaŭflanke ankaŭ loĝos la partoprenantoj. Fariĝos do ▶

## Enhavtabelo/Inhalt

**1:** Loka tribunalejo, kulturmonumento de Neumünster (el Wikimedia Commons, fotis Wusel007)

**2:** Adresoj

**3:** Germana Esperanto-Asocio:

Karaj legantoj! Enhavtabelo.

**4-5:** Interkultura Centro Herzberg:

Bänke-Rundweg "Esperanto" in der Esperanto-Stadt eingeweiht. Zsófia Kóródy en konferenco por lingvotestantoj. Alexander Melnikov hielt einen Vortrag über Rostow am Don

**6-8:** Aŭstria Esperanto-Federacio:

La Esperanto-kafejo en Graz festis sian 3-jaran jubileon. Cetere okazis. Sankta Meso en Esperanto por Paco kaj Justeco en Vieno

**9-10:** Germana Esperanto-Asocio: Sunplena kaj bonetosa 35-a PSI en Hochspeyer.

Polnischer Botschafter in Deutschland schlägt allmähliche Einführung von Esperanto vor. Fonduso HDP

**11-13:** Publika agado: Warum Esperanto zunehmend attraktiver wird. Esperanto vortrag vor 80 Hochbegabten in Hamburg

**14-15:** El la landaj ligoj: Venu en aŭgusto al Berlino: Ni festos la jubileon "10 jaroj Zamenhofparko". Korespondpeto

**16-17:** Medienecho.

**18-19:** Kalendaro

**20-22:** El bibliotekoj kaj arkivoj:

Folge 45 – Unesco-Welttag des Buches...

Folge 46 – mit einem Blick zurück, auf 111 Jahre Deutsche Esperanto- Bibliothek

**23-25:** ~~kune~~ – revueto de Germana

Esperanto-Junularo: 15-a BIERO – Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo 12. – 14. 4. 2019 en Chotěboř. "La fermita urbo". SeMEO

**26-27:** El la landaj ligoj: Aliĝilo al la 41-a BAVELO-Seminario 18a - 20a oktobro 2019 en Lörrach

**28:** Fotoj de Ralf kaj Zoja Haumer el la 35-a PSI en la natur-parka junulargastejo Hochspeyer 2019 (legu sur la paĝoj 9-10)

▶ verdira "transponta kongreso". La ponto inter Frankfurt kaj Slubice hodiaŭ estas simbolo por bona najbareco, kiu funkcias ankaŭ inter la esperantistoj ambaŭflanke, sur loka same kiel sur nacia nivelo. La kotizoj restos similaj al tiuj de la nuna kaj la lastaj jaroj. Unuan informilon pri la komuna kongreso ni esperas havi je dispono ĝustatempe por la Universala Kongreso en julio.

Amikajn salutojn,

via Ulrich Brandenburg

## Bänke-Rundweg "Esperanto" in der Esperanto-Stadt eingeweiht

Aktive des Harzklubs Herzberg waren beim gemeinsamen Projekt dabei.

Im März 2012 wurde die erste sog. "Esperanto-Bank" vom Harzklub Herzberg (am Wanderweg unterhalb der Klinik in Richtung Mühlenberg) gefertigt. Sponsor war das Esperanto-Centro Herzberg bzw. Esperanto-Freunde aus Dänemark und Deutschland. Nach und nach kamen weitere Bänke hinzu, z.B. im Domeyerpark, oben bei der Treppe zum Schloss Herzberg, beim Eingang zum Museum des Welfenschlosses, am Juessee, beim Wasserrad auf dem Zamenhof-Platz, usw.

Auch die Zukunftswerkstatt hatte zwei sog. "Esperanto-Bänke", nämlich der Herzberger Esperanto-Protagonisten "Joachim Gießner" und "Irene Gießner" kunstvoll gestaltet. Diese beiden Kunstobjekte können im Sinnesgarten der Zukunftswerkstatt Herzberg besichtigt werden. Beim Esperanto-Centro mit Garten gibt es ebenfalls entsprechende Sitzbänke.

Zwei weitere praktische und stabile Sitzbänke wurden ebenso durch den aktiven Harzklub Herzberg oben beim Katzenstein am Waldsaum errichtet. Von da aus hat man einen herrlichen Rundblick bis zum Rotenberg und weiter. Inzwischen sind schon 15 sog. "Esperanto-Sitzbänke" entstanden.

Ein neues zweisprachiges Flugblatt mit den diversen Bänke-Haltestationen für kleine Pausen können Interessierte beim Bürgerbüro der Stadt, beim Touristinfo und beim Esperanto-Centro Herzberg erhalten.



Gemeinsame kleine Einweihung durch die beiden Herzberger Vereine bei der sog. "Ersten Esperanto-Bank"

Für die beiden Vereinsvorsitzenden Hermann Schulze (Harzklub Herzberg) und Peter Zilvar (Esperanto-Centro) war es jetzt ein freudiger Moment, dieses gemeinsame Projekt in der schönen Natur der Öffentlichkeit vorstellen zu können. Auch sind weitere neue Ideen entstanden.

Etliche Aktive beider Herzberger Vereine trafen sich aus diesem Einweihungsanlass bei der "ersten sog. Esperanto-Bank" zu einem Gedankenaustausch mit Gruppenfoto.

## Zsófia Kóródy en konferenco por lingvotestantoj



Zsófia Kóródy en la konferenc-hotelo en Gento

Zsófia Kóródy el Herzberg, la Esperanto-urbo, estis la reprezentanto por Esperanto en la ĉi-jara konferenco por lingvotestantoj.

La ĉi-jara, jam la 53-a ALTE-konferenco (Asocio por Lingvotestistoj en Eŭropo) okazis en la universitato de la belga grandurbo Gento kaj daŭris de la 24-a ĝis la 26-a de aprilo. La konferencotemo estis Multlingva aliro al edukado (angle: *Multilingual access to Education*).

Jam de multaj jaroj Zsófia Kóródy, komisiito de UEA (fakte por la Esperanto-movado entute) partoprenis tiun ĉi gravan konferencon. Aperis i.a. gravuloj de la hungara ŝtata instituto por lingvoekzamenoj. En Hungario lingvaj ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro havas jam longan tradicion. Tio same inkluzivas la regulojn por lingvaj ekzamenoj en Esperanto en B1, B2 kaj C1 niveloj.



**Katja Lödor, estrino de la Esperanto-Klubo en Gent kun Petro Zilvar kaj Zsófia Kóródy.**

Mondfamaj ekzamenfakuloj, kiel Micheline Chalhoub-Deville (Universitato de Nord-Karolino), Cecille Hamnes (Okcident-Norvega Universitato de Aplikataj Sciencoj) kaj estroj de la universitato de Gento faris gravajn prelegojn pri aktualaj situacioj kaj evoluoj ĉe eŭropaj ekzamensistemoj. Krome kunsidis diversaj laborgrupoj, por diskuti specialajn temojn.

La konferenco pritraktis kelkajn faktemojn, kiel ekzemple rekomendojn pri ekzamenoj por migrantoj, kaj la kreskantan rolon de laŭnormaj testoj en lingvoinstruado.

Pli kaj pli la ŝtatoj en Eŭropo agnoskas tiajn laŭnormajn lingvoekzamenojn, kiuj kalkuliĝas ekz. kiel oficialaj kredit-pontoj por studentoj, aŭ kiel ekz. en Hungario, aldona postulo por akiri universitatan diplomon. En la nuna interkultura mondo lingvoekzamenoj estas aparte gravaj kaj devas respondi al la ŝanĝiĝantaj sociaj bezonoj.

Zsófia Kóródy jam konas multajn lingvoekzamen-specialistojn el diversaj landoj por diverslingvaj ekzamenoj kaj flegas bonajn kontaktojn al la gekolegoj. Ŝi regule kunagas ankaŭ en la speciala fakgrupo pri instruista klerigado, kiu nuntempe planas ellabori ekz. broŝuron pri tio, kion lingvoinstruistoj devas scii pri la KER-ekzamenoj, por kompetente prepari siajn studentojn laŭ la postularo, aŭ esti informantoj por siaj malpli spertaj gekolegoj kaj aliaj interesiĝantoj.

Apenaŭ restis tempo por rigardi la belegan grandurbon en Flandrio, kiu povas fieri pri historiaj domoj, katedraloj, kastelo kaj aliaj arkitekturaj belaĵoj.

Okaze de la vizito al Gent Zsófia Kóródy kaj mi, ŝia akompananto, ricevis inviton de la aktiva Esperanto-grupo por vizito kaj prelego en la regula, ĉiumonata klubkunveno. Ni montris bildojn pri Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, prezentis la bibliotekon de la Esperanto-Centro kaj rakontis pri la agadoj de la GEA-Filio kaj la loka Esperanto-klubo.

**Petro Zilvar**

## Alexander Melnikov hielt einen Vortrag über Rostow am Don

Im Rahmen der Bildungsangebote der Ländlichen Erwachsenenbildung (LEB) Südniedersachsen fand im Interkulturellen Zentrum Herzberg (Esperanto-Centro) ein besonderer Vortrag statt.



**A**uf Einladung des Deutschen Esperanto-Bundes machte Dr. Alexander Melnikov eine Rundreise durch Dänemark und durch ca. zwanzig Orte in Deutschland. In vielen Ländern präsentiert er gern in Vorträgen sein Heimatland. Dr. Uli Ender aus München, der Beauftragte des Deutschen Esperanto-Bundes für

Vortragsreisen, organisierte eine gelungene Vortragsrundreise zu vielen Esperanto-Gruppen in Deutschland. Dafür an dieser Stelle ganz herzlichen Dank an den Organisator.

Dr. Alexander Melnikov berichtete mit Bildern und Filmen über seine Heimatstadt Rostow am Don. Der Wissenschaftler wurde im Ural geboren, kam jedoch schon als Kleinkind mit seinen Eltern und der Großmutter in die Millionenstadt Rostow am Don. Das Klima im Süden des Landes sei recht angenehm.

Die Stadt liegt im südlichen Bereich der Russischen Föderation, unweit der Mündung des Dons in das Asowsche Meer. Er erzählte über die Geschichte der Region, Kultur, Bauwerke, usw. sozusagen "aus erster Hand". Die Zuhörer mussten oft die monumentalen Bauwerke, die er als Fotos präsentierte, erraten.

In seiner Stadt würden Menschen aus vielen Nationen leben, darunter im Verhältnis besonders viele Armenier. Gotteshäuser aller Art seien für die Menschen mit verschiedenen Religionszugehörigkeiten vorhanden.

Auch über die wirtschaftliche Situation und die politische Entwicklung in den letzten Jahrzehnten informierte er die Zuhörer. Der üblichen Meinung, dass die meisten Russen wohlhabend seien, widersprach er. Als pensionierter Universitätsprofessor bekäme er nur eine kleine Pension, die kaum reicht, um die Lebenshaltungskosten zu begleichen. Dr. Melnikov war froh, dass er während seines Lebens mehr als sechzig Länder (meistens zu Esperanto-Seminaren und Kongressen) besuchen konnte. Er hätte viele Freunde in der Welt, mit denen er Kontakt über das Internet hält.

Dr. Alexander Melnikov beantwortete auch gern alle Fragen der Teilnehmer und präsentierte die vielschichtigen Informationen auf heitere Art.

## La Esperanto-kafejo en Graz festis sian 3-jaran jubileon

La Esperanto-kafejo sur la Esperanto-placo, krom la monumento, estas ne nur speciala allogilo, sed ankaŭ montras klare, ke nia lingvo vivas.

**L**a mastro Christian Egger invitis siajn regulajn gastojn kaj geamikojn al la trijara jubileo. En la festo kompreneble partoprenis volonte ankaŭ kelkaj Graz-aj esperantistoj, ne nur ĉar estis riceveblaj senkostaj sandviĉoj kaj ĉampano...

Multaj gastoj, survoje de la stacidomo al la urbocentro, venas rekte en la domon, aŭ restas sur la granda teraso, verŝajne ankaŭ tial, ĉar la Annen-strato, kiel iam grava butikumejo de Graz, perdis multon de sia atmosfero kaj en la kvartalo apenaŭ ekzistas alloga kafejo. Sed la malgranda kafejo kun la dimensio de nur 28 kvadrat-metroj estas malfermita la tutan jaron, ankaŭ ĉar ekstere ĉiam okazadas multo kaj plej ofte eĉ la suno briladas tien el la direkto de la monumento sur la granda placo.

Ĉe la intervjuo post la festo, en kiu entuziasme partoprenis 80 gastoj, la agema mastro rakontis, ke li povas saluti kiel gastojn ankaŭ multajn esperantistojn ne nur el Eŭropo. Sed li kredas, ke multaj Graz-anoj, kiam ili efektive aŭdas Esperanton, erare interŝanĝas ĝin kun la hispana. Demandite, kial li ne parolas Esperanton, sed povas nur diri



kelkajn salutvortojn, li respondas, ke pro tio li ĝis nun ne estis kritikita de esperantistoj. Nur kun italoj li tute ne havas problemon, ĉar li havis italan amikinson. Li volonte lernus ĝin, se li vere havus tempon por tio dum la funkcia negoco. Fine de sia klarigo, kial li ankoraŭ ne parolas Esperanton, li

klare montras al la ekstera tabulo kun la Ejnŝtejna citaĵo "fantazio estas pli grava ol scio". Sed li esperas, ke li iam eble sukcesos kun kunlaboranto en la domo. Li ja ankoraŭ sole prizorgadas la negocon. Demandite kio okazas, kiam li malsanas, li simple respondas, ke tio ankoraŭ neniam okazis.

Kiam li antaŭe gvidis diskotekon en Deutschlandsberg, li ankoraŭ opiniis, ke Esperanto estas ĉilia banano, sed nun sur Esperanto-placo li vere alte aprezas Esperanton kaj fiere rakontas, ke la negoco evoluas vere bone kaj li havas multajn regulajn gastojn.

Dum la intervjuo ankaŭ kvin turistoj fotis la monumenton kaj entuziasme venis al la kafejo. La domo el la 13-a jarcento nove briladas kun sia fasado, renovigita nur antaŭ nelonge, kaj impresas varbas en la senco de la kultura ĉefurbo Graz. **Heinz-Paul Kovacic**



## Cetere okazis

### 2019-03-27: Kunsido de la Packomitato Vieno

(NGO *Committee on Peace United Nations Vienna*). La parolata lingvo estis la angla. Partoprenis 18 homoj el diversaj NROj (ne-registaraj organizoj). UEA estas unu de la partoprenantaj organizoj. Ĝi delegis s-ron Hans Michael Maitzen kaj ties anstataŭantojn (Florineth, Heiligenbrunner).

Ĉi-foje parolis kiel gastoj s-ro Valère Mantels, estro de la Viena UN-oficejo por malarmadaj aferoj (UNODA).

Li opinias, ke nukleajn armilojn oni ne konstruas por uzado, sed simple por fortimigo. El tiu ĉi vidpunkto la veraj minacoj ne venas de nukleaj armiloj. Pli danĝeraj estas la novaj evoluoj koncerne artefaritan inteligentecon. Li montris filmon por demonstri tion.[1]

### Samtipa kunveno okazis 2019-04-27

S-ino Sabine Bauer de CTBTO (organizo pri kompleta malpermeso de testado de nukleaj armiloj) [2] prezentis (anglalingve): “Aktuala progreso de kontraktigo kaj kontribuo de CTBTO al nuklea sekureco kaj malarmado”. CTBTO klopodas monitori ĉiujn aktivecojn, kiuj povus origini en atom-bombaj testoj.

Pli ol 300 aparatoj aŭskultas al sismaj subgrundaj ŝok-ondoj (*seismic underground shock waves*), flarumas pri radioaktiveco, aŭskultas al infra-sono super la grundo.

CTBTO okupiĝas pri kontraktoj koncerne nukleajn armilojn kun 44 ŝtatoj. 36 el ili subskribis kaj ratifis ĝin. Ruslando, ekzemple, signis kaj ratifis. Hindio kaj Pakistano nek subskribis, nek ratifis. Usono kaj Ĉinio subskribis, sed ne ratifis. Ĉiu ŝtato, kiu subskribis, pagas por la membreco en CTBTO.

La datuma centro (*data center*) de la organizo troviĝas en Vieno. Tiuj kunsidoj okazas unu fojon ĉiumonate.

[1] <https://www.youtube.com/watch?v=9CO6M2Hs0IA> – filmeto kun la nomo “*Slaughterbots*” pri batal-robotoj.

[2] <https://www.ctbto.org> CTBTO.



### 2019-04-03: Lingva Kafejo en Bratislava

En la kultura centro kafejo Dunaj renkontiĝas kutime inter kvin kaj dek esperantistoj, plejparte el Bratislavo kaj el la proksima Vieno. Ĉi-foje estis ses esperantistoj. Ni parolis pri nove eldonitaj libroj (“*Internaciaj vortoj en Esperanto*”[4], “*La Vojo al Harmonio*”[5]) kaj pri venontaj renkontiĝoj. Ĉiu kunportas iom da manĝaĵoj, trinkaĵoj estas aĉeteblaj en la studenta gastejo mem. La sekva kunveno okazis je 2019-05-01. Tiam kunvenis naŭ esperantistoj. Tiuj renkontoj okazas monate, ĉiam la unuan merkredon de monato [3].

[3] <https://www.goethe.de/ins/sk/de/spr/srv/scf.html> Goethe-Institut, Sprachencafe; ĝi organizas la “Lingvan Kafejon” en Bratislava

[4] *Internaciaj vortoj en Esperanto*, Peter Baláz, ISBN 80-969042-5-6

[5] *La Vojo al Harmonio*, Jaroslav Karhan, Kava-Pech, ISBN 978.80-87169-73-5

### 2019-04-04: La Esperanto-muzeo Vieno

okazigis la aranĝon “**Esperanto live**”. La teamgvidanto de la Esperanto-muzeo, s-ro Bernhard Tuider, persone gvidis la grupon tra la muzeo.

Li klarigis la historion de planlingvoj, rakontis pri Volapük, Esperanto kaj Ido. Li gvidis tra la kvin “sekcioj” de la muzeo: LUDO (Pak-man-stila [6] ludo pri bazaĵoj de Esperanto), ARTO (aŭskulteblas ekzemploj de diversaj planlingvoj, interalie Volapük, Ido, Klingona, Starckdeutsch), NATURO (ĝi montras, ke ankaŭ “naturaj” lingvoj sekvas lingvan planadon. Ekzemple la germana vorto “Gas” estis invento de s-ro Campe [8]), PRAKTIKO (sur mondmapo videblas Esperanto-rilataj bibliotekoj, muzeoj, ĉi-jaraj aranĝoj).

Ankaŭ la historio de IEMW mem estas interesa. Ĝi inaŭguriĝis antaŭ 90 jaroj, en la jaro 1929. Dum la nazia tempo la libroj estis savitaj de deportado kaj detruo. Ili estis tenitaj en la kelo de la nacia biblioteko, kontraŭ la intenco de la nazia reĝimo. Kelkaj tiamaj kunlaborantoj de la muzeo suferegis sub ĝi. Du el ili estis deportitaj al koncentrejoj kaj mortigitaj.



En la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj kelkaj firmaoj uzis Esperanton kaj Idon por varbi. La muzeo montras diversajn varbilojn.

Libroj kaj leteroj memorigas pri la fruaj parolantoj kaj subtenantoj (Hodler, Bertha von Suttner k.a.). En la legsalono eblas legi librojn el la Kolekto por Planlingvoj. Krom Esperanto troveblas tie informoj pri pli ol 500 planlingvoj. (La muzeo ja estas parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko.)

Je la fino de la plurhora prezentado s-ro Tuider gvidis lecionon pri Esperanto por komencantoj.

Gvidoj tra la muzeo [7] kaj fulmkursoj okazas laŭ ebleco. Rekomendinda estas sufiĉe frua anonco ĉe [kulturvermittlung@onb.ac.at](mailto:kulturvermittlung@onb.ac.at) aŭ telefone ĉe +43-1-53410-464. Prezojn bonvolu eldemandi tie.

[6] [https://de.wikipedia.org/wiki/Pac-Man\\_Pak-man\\_ludo](https://de.wikipedia.org/wiki/Pac-Man_Pak-man_ludo)

[7] <https://www.onb.ac.at/museen/esperantomuseum>, Esperanto-Muzeo Vieno

[8] [https://de.wikipedia.org/wiki/Joachim\\_Heinrich\\_Campe](https://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_Heinrich_Campe) Joachim Heinrich Campe

2019-04-15: Lingva Kafejo en Weltmuseum Vieno. Tie

renkontiĝas homoj, kiuj volas ekzerci lingvojn kiel la angla, germana, itala, hispana aŭ Esperanto. Ĉeestis ses esperantistoj. Ni babilis pri novaĵoj kaj ludis esperantlingvan kartludon: “La ludo de la nuda vero”.[10]

Tiuj renkontiĝoj okazas ĉiun duan lundon. Venontaj renkontiĝoj estos videblaj ĉe la hejmpaĝo de la Weltmuseum. [9] <https://www.weltmuseumwien.at/programm/#kalender> Weltmuseum programo

Cetera kunveno okazis 2019-04-29 kun kvin esperantistoj, plus mallonge unu interesita virino.

[10] <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8445>. Ludo de la nuda vero, mendebla tie.

**2019-04-20:** Kradrostado en Lasee. Dum Paska Sabato esperantistoj kunvenis en AT-2291 Lasee por kune kradrosti kaj iom babili. Kunvenis 10 homoj. Inter ili estis esperantistoj el Aŭstrio, esperantistoj el Slovakio kaj kelkaj ne-esperantistoj. Partoprenis ankaŭ la muzikistoj, kiuj akompanas la di-servon en Schönstatt

la 22-an de Junio [11]. Ni kantis, dancis, kuiris, manĝis, kartludis, babilis. **Alfred Heiligenbrunner**

## Sankta Meso en Esperanto por Paco kaj Justeco en Vieno

Sabaton, la 22-an de junio 2019 je la 14-a horo estos celebrata Sankta Meso en la lingvo Esperanto, en kapelo de Schönstatt, sur Kahlenberg, kun subpastro d-ro Albert Reiner. Muzikprovo komenciĝos je la 13-a horo en la domo por gastoj malantaŭ la bistroo. Estu elkore bonvena.

Ĝi estas atingebla per metroo 4 (Heiligenstadt) aŭtobuso 38A (Sulzwiese). Aŭtomobile: Höhenstrasse (“strato al la alteco”), tabulo Schönstatt. Parkejo ekzistas surterene. Koordinatoj: 16.31944° 48.27777°

La centro de Schönstatt sur Kahlenberg estas loko, kiu inspiras apartan forton. La sanktejo meze de la Viena Arbaro; la bela loko helpas retransviliĝi kaj poste rekomenci energie siajn taskojn ... Tie troviĝas la centro de la katolika Schönstatt-movado de Aŭstrio. Okazas ĉiusemajne/semajnfine unu, du aranĝoj por familioj, junuloj, virinoj kaj aliaj renkontiĝoj. Vizitas la lokon internaciaj pilgrimoj.

“Am-alianco kun Maria, nenio sen Vi – nenio sen ni”, farita de P. Josef Kantenich kaj junuloj de Pallotti-seminario kun Maria en la Schönstatt-kapelo. Tiu am-alianco havis gravajn konsekvencojn. En tiu spirito kiel soldatoj en la unua mondmilito la disĉiploj de P. Kantenich luktis por siaj idealoj, farante grupojn, komunikante perletere inter la grupoj kaj per propra gazeto. Kun granda braveco ili plenumis sian servon, ekzemple libervole portante la provianton por la kamaradoj al antaŭaj pozicioj inter kugloj kaj grenadoj. Tiu kuraĝo elradiadis kaj aniĝis multaj aliaj soldatoj kaj flegistinoj.



P. Reinisch

La unua pastro de Schönstatt el Aŭstrio estis la martiro P. Franz Reinisch. Naskiĝinte 1.2.1903 en Feldkirch, li vivis kaj edukiĝis en Innsbruck. Studante juron li estis konata kiel tre societema homo en la tuta urbo. Kiam li pasigis eksterlandajn semestrojn en Kiel, Germanio, ŝokis lin la mizero en la havena regiono. Li ŝanĝis la studadon al teologio kaj pastrigiĝis 29.6.1928. Amiko el la pastra seminario invitis lin al

kongregacio de Pallotti, al kiu li aniĝis samjare. Poste li trovis sian spiritan fonton en Schönstatt apud Koblenz sur Rejno. P. Reinisch translokiĝis al Schönstatt kiel kunlaboranto de P. Kantenich. En pasiaj predikoj li ne evitis kontraŭdirojn al la nazia ideologio. Tial la superuloj por gardi lin ofte translokiĝis lin al diversaj lokoj. Tamen la registaro malpermesis al li prediki. Kiam en aprilo 1942 oni ordonis lin soldatiĝi, li rifuzis soldatan juron al Hitler. Tial li estis kondamnita al morto kaj gilotinita 21.8.1942 en Berlin-Görden.

Post unu jaro Franz Jägerstätter (deklarita kiel beatulo de la eklezio en 2007) troviĝis en la sama malliberejo – ties pastro rakontis pri P. Reinisch. Tio kuraĝigis Jägerstätter al la sama martireco. En 2013 komenciĝis la beatiga procedo por P. Reinisch.

**Karlo Reinisch**

Vidu ankaŭ: [http://www.esperanto.at/neuigkeiten/artikelanzeige/?tx\\_ttnews%5Btt\\_news%5D=17&cHash=b4f5a2d7ea755408190cc8b1c2108c6e](http://www.esperanto.at/neuigkeiten/artikelanzeige/?tx_ttnews%5Btt_news%5D=17&cHash=b4f5a2d7ea755408190cc8b1c2108c6e), resp. petu informojn ĉe: [aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at)



# Sunplena kaj bonetosa 35-a PSI en Hochspeyer

**Pli ol 70 esperantoparolantoj renkontiĝis ĉi-jare meze en la Palatinata arbaro en la natur-parka junulargastejo Hochspeyer por komune aŭdi prelegojn, ekskursi, danci, festi Paskon kaj babili kun amikoj.**



**D**um la tuta semajno ni ĝuis abundan programon kaj belegan printempan veteron: por ŝatantoj de la frua mateno komenciĝis la tago per Ĉigongo (Dieter Menke) aŭ per la matena laŭdo (Georg Weil).

La Esperanto-kurso por la komencantoj (Helmut Klünder) okazis post la matenmanĝo, en kiu ankaŭ partoprenis viro el la regiono, instigita de la gazeta artikolo kaj intereso por la ideo de Esperanto. La sama intereso aŭ scivolemo venigis al ni ĵurnalistinon de la regiona gazeto. Ŝiajn impresojn pri Esperanto, ĝia ideo kaj pri nia renkontiĝo, ni povis legi en la sekvontaga gazeta artikolo. Tiuj, kiuj volis perfektigi aŭ plibonigi sian Esperanton, trovis ĝustan lokon en la kurso por progresintoj (Yves Bellefeuille).

Dimitrij Ševĉenko informis nin en siaj prelegoj pri novaĵoj kaj perspektivoj de la eldono "Impeto". Plie li prezentis al ni la revuon "Esperanto" (kies redaktoro li estas kune kun Anna Striganova), kaj la novan projekton de UEA, la retan revuon "Esperanto".

Feliĉe la multnombraj invitklopodoj por samideano François Hounsounou el Benino sukcesis, kaj tiel ni povis aŭdi unikajn prelegojn pri la Afrika Centro Mondcivitana, la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto en Burundo, kaj pri la lingvoj en Benino. La aŭskultantoj uzis vikle la eblecon por diskuti kaj demandi pri ĉio ajn temo koncerne de Afriko.

Klaus Rumrich pruvis al ni en unu de siaj prelegoj, ke ekzistas en la (matematika) mondo grandegaj kaj eĉ pli grandaj nombroj (Guglo, Giganto, Monstro k.t.p.) kiuj superis la imagkapablecon. La dua prelego de Klaus pri menskalkulado tre impresis per multaj faciligaj manieroj multipliki plurciferaĵojn kaj per simpla metodo, menskalkuli la semajntagon de iu dato.

Sinjoro Pastoro Kronenberger prezentis sian novan kant-libron "Kantu", kaj festis kun kelkaj partoprenantoj la Sanktan Meson je la verda jaŭdo. Rob Keetlaer informis pri la eble plej granda internacia sporta evento en la mondo, la Nimegaj Marŝoj, kaj parolis pri siaj ideoj en la prelego "Kiel krei faklibraron". Interesajn, ofte nekonatajn faktojn (ne nur historiajn) diskonigis Helmut Klünder dum sia prelego pri la parko de Wörlitz, kiu ankaŭ estos ekskursocelo de la venontjara PSI en Wittenberg.

Memkompreneble la programo ne nur konsistis el prelegoj. Ĉe sportaj kursoj, kiel sindefendado (Tobias Menzel) kaj Zumba (Zoja Haümer), la partoprenantoj povis movi siajn korpojn. Kaj por tiuj, kiuj volis

trankviliĝi kaj ripozi post streĉa ekskurso, malstreĉiga gimnastiko de Anna Dupechaud estis la ĝusta metodo. En la "manlaborejo" de Nicky Janssen, Zoja Haümer, Marika Frense kaj Ines Frank, infanoj kaj plenkreskuloj interalie diligente preparis paskajn ornamaĵojn, faldis elsorĉatajn figurojn el papero, braceletojn, aŭ kreis ornamaĵojn por la kostuma balo kun la temo "arbaro". Pri denove belaj kolorigitaj sakoj kaj T-ĉemizoj zorgis Georg Weil en sia liberaera "ŝtofokoloriga metejo".

Posttagmeze preskaŭ ĉiutage okazis ekskursoj. Ni ekskursis al la urbo Kaiserslautern, kun vizito de la japana ĝardeno kaj promonado tra la ĝardeno ekspozicio, en kiu troviĝas la plej granda kolekto de dinosaŭro-modeloj en Eŭropo. Nia tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Neustadt kaj la kastelo Hambach. La fervojemuloj vizitis privatan modelfervojon (en la skalo 1:22,5) en Miesenbach-Ramstein. Ni vizitis la belan vinurbon Bad Dürkheim kun la barilego kaj la 330 m longa salkolekta muro. La ekskurso al la burgo Nanstein, konstruita de la imperiestro Barbarossa, ankaŭ vekis intereson de la partoprenantoj, same kiel la "Swingolf"-ludado en Hochspeyer mem.

Vendrede vizitis nin televida teamo de SWR. Ili filmis dum nia antaŭtagmeza programo kaj intervjuis kaj plenkreskulojn kaj infanojn.

La rezulto de ilia laboro estas videbla en la mediateko de SWR: <https://swrmediathek.de/player.htm?show=41b71c20-639f-11e9-a7ff-005056a12b4c>

La tuttagan libroservon de FEL prizorgis Gerd Jacques. Ĝi estis ankaŭ ĉi-jare ŝatata renkonteĵo por traserĉi la libron, foliumi kaj aĉeti librojn kaj babili.

Post la vespermanĝo estis la ebleco ĝui tre interesan prelegon pri la historio de fabeloj kaj ilia aparta lingvo, kiun ĉarme kaj detaliĉe Anna Striganova prezentis. Dum la koncerto de Kim Henriksen el Danio kun konataj kantoj kiel "Ska-virino", "En la mateno" kaj "Sola" la partoprenantoj entuziasme kaj laŭte kunkantis. La koncerto estis sekvata de la jam menciita kostuma balo kun la temo "arbaro". Renkontiĝis sorĉistinoj kaj sorĉistoj, elfoj kaj elfinoj, arboj kaj folioj, luphomoj kaj gnomoj, kiuj tamen :-)) paceme kaj gajege dancis unu kun la alia.

Ne nur la infanoj, sed ankaŭ la plenkreskuloj estis ravitaj de la premiero de la pupteatraĵo "Festo por Findus" de nia estimata Christoph Frank. La belega kaj amplene aranĝita scenejo kaj amuzaj dialogoj inter Petterson kaj Findus subtenis la unikan vesperon. "Festo por Findus" rikoltis multe da aplaŭdo. Ankaŭ ĉi-jare ne mankis la Paska fajro kun bastonpano kaj komuna kantado.



Denove kunestis partoprenantoj, kiuj ĝis nun ne konis Paskan fajron kun bastonpano. La bela kaj agrabla vetero instigis longe sidi kaj ĝui la varmecon de la fajro.

La fino de la 35-a PSI venis tro frue – kiel ĉiam. Ĝi ankaŭ anoncis la lastan programeron de tiu ĉi agrabla semajno, la internacian vesperon. La Mazi-infanoj prezentis siajn konojn, kiel ankaŭ Paula Weil dum ĵonglada parto de la vespero. Ni aŭdis ŝercojn de Andreo kaj miris pri la kapabloj de la “senila matematikisto Rapi Kalku el Kalkuto”. La prezentado de la nova renkontiĝejo en la jaro 2020 Wittenberg (la urbo de Marteno Lutero) kaj dankado al ĉiuj kontribuantoj kaj al la organiza teamo finis la lastan komunan vesperon.

Ĉiutage la partoprenantoj sidis vespere ĝis post noktomezo, babilante kaj ludante en la salonoj de la domo, kiujn ni deklaris kiel “knajpon”.

Ni travivis denove amuzan, instigan, agrablan, sunplenan kaj interesan paskan semajnon, kune kun niaj geamikoj (vidu ankaŭ la fotojn sur la lasta paĝo!).

Do, ĝis revido en Wittenberg ĉe la 36-a Printempa Semajno Internacia, de la 6-a ĝis la 13-a de aprilo 2020!

Aliĝoj jam eblas per <https://psi.esperanto.de>

**Ralf Haümer**  
kaj la organiza teamo de PSI

## Polnischer Botschafter in Deutschland schlägt allmähliche Einführung von Esperanto vor

**D**er polnische Botschafter in Deutschland, Andrzej Przyłębski, hat die allmähliche Einführung der internationalen Sprache Esperanto vorgeschlagen. Bei einer Diskussionsveranstaltung in Eberswalde bei Berlin verwies er Anfang Mai darauf, dass in der EU mit dem Ausscheiden Großbritanniens die Rechtfertigung für Englisch abnehme.

**14–20: Ekskurso tra la tri baltaj landoj.** Litova Esperanto-Asocio proponas pasigi unu semajnon post la fermo de BET-55 (14.07.2019), ekskursante tra la tri baltiaj landoj Litovio, Latvio, Estonio, kaj grupe veni al Lahtio por la Universala Kongreso. Informas: Organiza Komitato de BET-55, pk 167, LT-44002 Kaunas, Litovio. Retadreso: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt), telefono: +370-687-12219; +370-686-69875

**20–27: La 104-a Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio, Finnlando.** Organizas: Universala Esperanto-Asocio. Retadreso: [kongresoj@co.uea.org](mailto:kongresoj@co.uea.org)

**20–27: Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj** (85-a IKBE) en Lahti, Finnlando. Okaze de la 100-jara datreveno de Steleto IKBE-kongresanoj rajtas partopreni la samloke kaj samtempe okazontan Universalan Kongreson de Esperanto (104-a UK). Prelegoj i.a. pri signifo de Esperanto por blinduloj kaj ilia internacia kunlaboro, novaj helpiloj, lumtekniko. Organizas: Steleto, Esperanto-asocio de vidhandikapuloj, Pietarinkatu 10 D 27, FI-00140 Helsinki, Finnlando. Retadreso: [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)

**20–27: 48-a Internacia Infana Adolekanta Kongreseto** en Lahti, Finnlando. Infanoj kaj adoleskantoj kune lernas kaj ludas, dum iliaj gepatroj ĉeestas UK-on. Organizas: IIK-skipo. Retadreso: [infana.kongresetogmail.com](mailto:infana.kongresetogmail.com); [infana.kongreseto@gmail.com](mailto:infana.kongreseto@gmail.com)

**22–27: ĜUPR en Prago, Ĉeĥio.** Ĝuu Pragon! Aranĝo en la ĉefurbo de Ĉeĥa Respubliko, dum kiu atendas vin promenoj tra Prago, ekskursoj ekster Prago, gustumado de ĉeĥaj specialaĵoj, vizito de bierfarejo, bovlingo, komunaj vesperoj. Organizas: E-mental'. Retadreso: [e-mentalprago@seznam.cz](mailto:e-mentalprago@seznam.cz)

**22 jul–1 aŭg: 41-a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj,** REF - en Mühlhausen, Thüringen, N51°13'/E10°27', Germanio. Komuna restado de familioj, kiuj uzas Esperanton kiel unu el siaj hejmaj aŭ familiaj lingvoj. Varia programo, kiun aranĝas kaj plenumas la partoprenantoj mem – gepatroj kun infanoj: komuna kantado, skeĉoj, filmvesperoj, rakont-vesperoj, koncertoj, plurtaga serĉado de fantomo, promenoj, ekskursoj, gepatraj interkonsiliĝoj, lokaj popoldancoj, sportoj teamaj kaj tandemaj, lingvaj kaj E-kulturaj atelieroj por infanoj kaj plenkreskuloj. Organizas: Carolin kaj Robert Weemeyer. Retadreso: [carolinverena@gmail.com](mailto:carolinverena@gmail.com)

**jul–aŭg: Esperanto-Karavano 2019** – postkongresa Esperanto-Karavano tra Rusio, Mongolio, Ĉinio (kunlabore kun lokaj E-organizoj). Organizas: Tatjana Loskutova, Ivanovo, Rusio. Retadreso: [esperantokaravano@gmail.com](mailto:esperantokaravano@gmail.com)

**25–28: Fieru!** La GLATa Esperanto-Renkontiĝo en Halbe, Germanio. Bonvenas la tuta GLATa-komunumo

– gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj, transgenruloj, kaj krome ĉiuj aliaj kiuj emas! Organizas: Esperanto-Stacio, Bahnhofstraße 30, 15757 Halbe, Germanio. Retadreso: [m.me/esperantostacio](http://m.me/esperantostacio)

**26 jul–4 aŭg: PollandRok** – Pol'and'Rock – en Kostrzyn ĉe la rivero Oder/Odra, Pollando, 5 km de la german-pola landlimo, 95 km de Berlin. Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuzikfestivalo Pol'and'Rock, kiu antaŭe nomiĝis Przystanek Woodstock (500.000 homoj). Inf.: Andi Münchow. Rete: [andim@gmx.li](mailto:andim@gmx.li), per Telegramo: [t.me/Andi\\_E](https://t.me/Andi_E)

**28 jul–4 aŭg: 75-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)** en Liptovský Hrádok, Slovakio. Ĉeftemo de la kongreso: Kontraŭ antaŭjuĝoj. Organizas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO. Retadreso: [ijk2019@tejo.org](mailto:ijk2019@tejo.org); <https://ijk2019.tejo.org/>

## Aŭgusto 2019

**6–16: 9-a Festa Semajno** en Esperanto-Kastelo Greziljono, Baugé, Francio – por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, kun beboj, gekuzoj kaj geavoj. Organizas: MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Retadreso: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org); <http://gresillon.org/spip.php?rubrique49&lang=eo>

**9: Ni festu la jubileon “10 jaroj de Zamenhofparko”** en Berlino. Je la 15-a horo en la Konsilantara Salonego de la Urbodomo de Lichtenberg estos malfermita la ekspozicio “10 jaroj Zamenhofparko - Esperanto-kulturo en Berlin-Lichtenberg”, kaj vespere ekde la 19-a horo en Zamenhofparko Berlin-Lichtenberg okazos literature-muzika aranĝo. La konata pola Esperanto-bardo Jerzy Handzlik kaj aliaj kantistoj kaj muzikistoj elpaŝos. Ni atendas kaj loĝantojn el la kvartalo kaj esperantistojn el diversaj landoj, inter ili el Bjalistoko kaj el Leeuwarden, nederlanda urbo kun Zamenhofparko. Organizas: Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio. Retadreso: [ronaldschindler@web.de](mailto:ronaldschindler@web.de), <https://esperanto.berlin/10-jaroj-zamenhofparko-ni-festos-la-9-an-de-augusto/>

**10–17: 69-a kongreso de KELI** en Révfülöp, Hungario. Dum la semajno ni povos ekkompreni, kion signifas hodiaŭ “...mi estis fremdulo kaj vi gastigis min”. Preĝoj, prelegoj, ekskursoj kaj interesaj homoj atendos vin. Organizas: KELI - Kristana Esperantista Ligo Internacia, HU-1400 Budapest, Pf.: 5., Hungario. Retadreso: [agnes@raczkevy-eotvos.com](mailto:agnes@raczkevy-eotvos.com)

**17: Paralela Universo - Tutmonde.** Paralela Universo estas unutaga festo de Esperanto, okazanta en diversaj lokoj samtempe. La eventoj inkluzivos tagmanĝon, grupan agadon, vespermanĝon, kaj daŭros proksimume de la 12:00 ĝis la 20:00. Lokaj grupoj komunikiĝas per “Telegramo” por montri bildojn kaj filmetojn al aliaj partoprenantoj tra la mondo. Organizas: Centra Komitato de Paralela Universo. Retadreso: <https://paralelauniverso.com>, [paralela.universo@gmail.com](mailto:paralela.universo@gmail.com)

## Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

### Folge 45 – Unesco-Welttag des Buches...



... das war diesmal kurz nach Ostern, und (fast) keiner hat es gemerkt. Sie etwa? Und wie haben Sie dann diesen Tag begangen?

Mit Kindern feiert man üblicherweise ein Lesefest oder eine ganze Lesenacht, was diese noch viel besser annehmen.

Der diesjährige Termin ist ja nun verstrichen. Das Thema bleibt aber immer angesagt und sollte im Fokus bleiben, nicht nur einmal im Jahr. Wichtig ist und bleibt es, schon und gerade bei jungen Leuten die Kontaktscheu abzubauen und sie für Bücher zu begeistern; angesagt bleibt also *das Vorlesen!*

Diesen Welttag des Buches proklamierte die Unesco 1995, und sie hat sich dazu wohl von einem Brauch in Katalonien anstiften lassen. Am Sant-Jordi-Tag beschenkt man sich traditionell mit Rosen und Büchern. Sant Jordi ist der Schutzpatron der Katalanen, und sein Fest ist immer am 23. April, dem St-Georgs-Tag. Ob diese Tradition tatsächlich bis ins 15. Jahrhundert zurückreicht, lässt sich nicht belegen.

Aber als Spanien 1926 den Todestag seines Nationaldichters Miguel de Cervantes Saavedra als Tag des Buches festlegte, war das "zufällig" gerade der 23. April – wirklich Zufall? Mag sein.

Darüber hinaus sollen die Spanier ja durch die Briten inspiriert worden sein, die traditionell an Shakespeares (vermutetem) Geburts- und Todesdatum (nach julianischem Kalender) einen Tag des Buches feierten, an dem man Büchergutscheine an Kinder verschenkte.

In ihrem Dokument von 1995<sup>1</sup> hob die Unesco darauf ab, dass Bücher in unserer Geschichte der stärkste Faktor bei der Verbreitung von Wissen waren, ganz abgesehen davon, dass sie das effektivste Mittel zur Bewahrung des Wissens sind. *Bücher dienen der Bildung und Aufklärung*; sie tragen dazu bei, *ein kollektives Bewusstsein für kulturelle Traditionen* auf der ganzen Welt zu entwickeln und zu einem neuen Verhalten anzuregen, das auf Verständnis, Toleranz und Dialog basiert.

Das gibt doch sicherlich *allen* Bibliophilen Auftrieb, nicht nur mir!

Auch wenn ich mich wiederhole: wer mit jungen Leuten zu tun hat und sie fördern will, sollte *unbedingt vorlesen*. Das ist hinlänglich bekannt. Weniger bekannt oder bewusst ist aber vielen: man sollte dabei *nicht zum modernen elektronischen Buch* greifen, schon um des guten Vorbilds willen!

1) <https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000101803>

2) <https://uebermedien.de/36022/filly-magazin-quengelware-zum-lesen/>

Auf einer Seite, die über Medien berichtet<sup>2</sup>, las ich gerade *“Angeblich laufen dem Gedruckten die Leute weg. Angeblich schauen Jung und Alt nur noch auf Bildschirme und wischen eine ehrwürdige Tradition einfach beiseite.”* Eine gute Zielgruppe für Gedrucktes wird dort dennoch genannt: es sind kleine Kinder, solange sie sich dem Digitalen beharrlich verweigern, oder solange ihnen dieses (noch) beharrlich verweigert wird.

Das ist gerade die Zeit, da für sie das *“Umblättern noch eine knifflige Kulturtechnik”* darstellt und *“mit dem sinnlichen Versprechen lockt, dass auf jeder weiteren Seite neue Wunder warten.”*

Unseren Fokus erweitern kann der Blick von Johano (Roberto) Strasser, den Esperantofreunde von seinem Buch *“Der Klang der Fanfare”* kennen. Der Sohn pazifistischer Esperanto-Anhänger (daher seine Esperanto-Vornamen) wurde am 1. Mai 80 Jahre alt und ging wohl inzwischen auf Distanz zur Esperanto-movado, schrieb aber über seine Eltern<sup>3</sup>: *“Ili kredis, ke per disvastigo de la artefarita lingvo Esperanto inventita de Ludoviko Zamenhof ĉiuj etnaj, religiaj kaj kulturaj baroj estos venkataj, kaj la homoj en la tuta mondo povus pace vivi kune.”* (so die Wikipedia<sup>4</sup>).

Strasser sieht also auch in unseren digitalen Zeiten noch nicht das Ende des gedruckten Buchs<sup>5</sup> gekommen; denn im Internet, am Bildschirm und bei E-Books fehle das typische Leseerlebnis. *“Man kommt nicht in das Lesen hinein, das langsam einen Eindruck aufbaut.”* Er findet das Erzeugen innerer Bilder als ganz wesentlich, wenn man sich in eine Lektüre vertiefe. Und genau das könne bei digitalem Lesen mit dauerndem Scrollen gar nicht aufkommen. Innehalten, Aufschauen und mal zurück Blättern, das ist vonnöten!

Vor Monaten hatte ich schon einmal gefordert: *“kein Bier für Idioten!”* Es ist schön, dass ich keinem solchen Zeitgenossen mehr begegnete. Und da ich annehmen kann, dass keiner unserer Leser zu diesem Kreis zählt, weise ich der Billigkeit halber (für den Begriff *aequitas* ist mir keine Bezeichnung geläufig) gerne darauf hin, dass gleichzeitig am 23. April auch der *“Tag des deutschen Bieres”* stattgefunden hat.

Na denn: Prost! – ich hoffe doch, man sieht sich, zu Pfingsten in Neumünster, vielleicht auch auf ein kleines Helles ...

Utho Maier



3) Als wir noch Götter waren im Mai, Erinnerungen 2007

4) [https://eo.wikipedia.org/wiki/Johano\\_Strasser](https://eo.wikipedia.org/wiki/Johano_Strasser)

5) <https://www.onetz.de/deutschland-welt/strasser-digital-bringt-kein-leserlebnis-id2707020.html>

## Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

### Folge 46 – mit einem Blick zurück, auf 111 Jahre Deutsche Esperanto- Bibliothek



Ein Karnevalsverein sind wir ja nicht, aber "schöne Gedenkjahre" sollten wir dennoch ein wenig feiern. Wenn mich meine Aufzeichnungen nicht trügen, dann wird die Institution unserer Deutschen Esperanto-Bibliothek (als Einrichtung, nicht der aktuelle Standort in Aalen) bald *111 Jahre* alt – aus der Taufe gehoben wurde sie ja auf dem Dresdener UK 1908.

Und daher wäre es doch mal an der Zeit, die Anfänge und Entstehungsgeschichte aufzuarbeiten, sofern das nicht schon geschehen ist. Doch dazu ist mir (noch) nichts bekannt, und bis zum 125. Jahr möchte ich ungem. warten, weil ich dann ja auch schon 80 Jahre alt sein werde und möglicherweise nicht mehr dafür aktiv genug, wer weiß.

Ich bitte daher um Hinweise, wenn jemand Material dazu kennt (oder besser noch: Personen, die sich damit bereits befasst haben).

Bei dieser Gelegenheit noch eine andere Bitte an unsere Mitglieder und Leser: wurde schon mal die Geschichte des D.E.B., vor allem seine Anfangszeit, historisch aufgearbeitet? Auch da ist mir nichts bekannt, aber das ist ja auch nicht mein primäres Interesse. Dennoch, so finde ich, sollte man das nicht außer Acht lassen.

In den letzten Wochen habe ich mich mit der Reihe "Das Esperanto, ein Kulturfaktor" (in 8 Bänden) befasst:

- [1]. Möbusz, Albin Friedrich Richard \*1871-1934\* (= Amo, Pseud.) [Hrsg.]: Festschrift anlässlich des 6. Deutschen Esperanto-Kongresses in Lübeck. - Leipzig D.E.B. 1911. 187 S.
- [2]. Ledermann, Richard \*1875-1972\* [Hrsg.]: Festschrift anlässlich des 7. Deutschen Esperanto-Kongresses Danzig, Zoppot, vom 27. Juli bis 1. August 1912. - Leipzig D.E.B. 1912. 211 S.
3. Christaller, Paul Gottfried \*1860-1950\* [Hrsg.]: Festschrift anlässlich des 8. Deutschen Esperanto-Kongresses Stuttgart. - Leipzig D.E.B. 1913. 163 S.
- [4]. Lösche, [Ernst] Bernhard \*1860-1928\* [Hrsg.]: Festschrift anlässlich des 9. Deutschen Esperanto-Kongresses Leipzig, Pfingsten 1914. - Leipzig D.E.B. 1914. 344 S.
5. Trögel, Robert, 1888- [Hrsg.]: Festschrift anlässlich des 14. Deutschen Esperanto-Kongresses in Magdeburg, Pfingsten 1925. - Leipzig D.E.B. 1925. 96 S.
6. Schmalzl, Josef \*1883- \* [Hrsg.]: Festschrift anlässlich des 15. Deutschen Esperanto-Kongresses in München, Pfingsten 1926. -Leipzig [u.a.] : D.E.B. ; 1926. 80 S.
7. Dahmen, Hans \*1884- \* [Hrsg.]: Festschrift anlässlich des 16. Deutschen Esperanto-Kongresses in Köln, Ostern 1927. - Leipzig D.E.B. 1927. 137 S.

8. Schwartz, Alexander \*1888- \* [Hrsg.]: Festschrift anlässlich des 17. Deutschen Esperanto-Kongresses Potsdam, Pfingsten 1928. - Leipzig D.E.B. 1928. 133 S.

Zumindest aus dem ersten Band möchte ich hier gerne einiges zitieren (statt eines Scans/Nachdrucks).

Der Leitbeitrag war überschrieben "Der Deutsche Esperanto-Bund." und stammte aus der Feder des Altonaer Arztes Dr. Eduard Mybs \*1858-1923\*. Mybs war ja Esperantist seit 1904, Mitglied des Lingva Komitato und Vizepräsident der Akademio de Esperanto und des 1. UK in Boulogne-sur-Mer 1905 sowie Präsident des berühmten UK in Dresden 1908 (do de "la kvaro por la kvaro"), dazu Vorsitzender der 1906 in Braunschweig gegründeten Deutschen Esperantisten-Gesellschaft, die zunächst ein Verein von einzelnen Mitgliedern war und sich 1909 in einen Bund von Esperanto-Gruppen umwandelte und seither Deutscher Esperanto-Bund heißt. Eduard Mybs war dessen Vorsitzender, bis 1911. Hier die Zitate:

"Schon im Jahre 1904 wurde in den "Esperantistischen Mitteilungen", die unter der Redaktion des um die Esperanto-Bewegung hochverdienten Jean Borel im Verlage der Berliner Firma Möller & Borel erschienen, die Frage einer einheitlichen Organisation der Esperantisten in Deutschland angeregt, aber man war allgemein der Ansicht, daß die Gründung einer "Deutschen Esperanto-Gesellschaft noch verfrüht sei. Auch ein von Herrn Hauptmann L. E. Meier in München im gleichen Jahre gemachter Versuch zur Gründung einer "Deutschen Esperantisten-Gesellschaft (Germana Societo Esperantista)" zeigte klar, daß "die Frucht noch nicht reif war".

Anders lag die Sache nach dem gewaltigen Erfolge des ersten internationalen Esperantokongresses in Boulogne, 1905, der auch für die deutsche Bewegung die Gründung einer Reihe neuer Gruppen und einen bedeutenden Aufschwung der Esperanto-Bewegung in Deutschland zur Folge hatte. Schon in Boulogne war der Wunsch laut geworden, möglichst bald die Belastungsprobe des Esperanto auf seine Tauglichkeit für die internationale Verständigung, die sich im romanischen Lande so einwandfrei gezeigt hatte, auf germanischem Boden, in Deutschland, zu wiederholen.

Aufs neue wurde deshalb die Frage der Organisation der deutschen Esperantisten angeregt durch einen Artikel im November 1905 (S. 113) des "Germana Esperantisto". Im Februar 1906 brachte diese Zeitung einen Aufruf der Braunschweiger Gruppe, aus dessen Text wir folgendes anführen (S. 20):

"Por efektiviĝi kiel eble plej baldaŭ la proponojn pri esperantista organizado en Germanujo, malmolvitaj [!] en la novembro kaj decembra numeroj de "G.E." la ĝenerala kunveno de l'Brunsviga grupo (okazinta la 11an de januaro) decidis inviti la germanajn kaj germanaŭstrajn esperantistojn veni Brunsvigon en aprilo aŭ majo 1906 por tie pritrakti rilatantajn rilatantajn demandojn kaj fondi "Germanan Societon Esperantistan." ...

Nach Erledigung dieser Vorarbeiten fand der erste deutsche

Esperantisten-Kongreß ... 1906 in Braunschweig ... statt. ... Die neue Gesellschaft nahm zunächst den Namen "Germanlingva Esperantista societo" (Deutschsprachliche Esperantisten-Gesellschaft) an, namentlich mit Rücksicht auf die Teilnahme unserer österreichischen Freunde, änderte aber diesen Namen bereits im Juni 1906 in Germana Esperantista Societo (Deutsche Esperantisten-Gesellschaft) um."

Ich persönlich fand diese Lektüre aufschlussreich und wünsche, dass sie Appetit mache, auf mehr davon. Damit sollte es genug sein, dachte ich zunächst. Ich möchte hier wenigstens kurz referieren, wie es um die Verbreitung des Esperanto in Deutschland so stand.

Bis Ende 1902 gab es noch keine Gruppe. In den Folgejahren stieg deren Anzahl beständig, von 2 Gruppen in 1903, dann 22 bis hin zur Anzahl von 179 Gruppen in 1909. Doch davon waren nur 12 Gruppen mit ihren 996 Mitgliedern dem D.E.B. angeschlossen.

Danach ging es aber steil aufwärts, so dass man am 15.4.1911 schon bei 197 angeschlossenen Gruppen mit 5668 Mitgliedern war. Daneben soll es noch 37 Gruppen im "Bund Deutscher Arbeiter-Esperantisten" gegeben haben sowie 20-30 weitere, die isoliert waren.

Es versteht sich wohl von selbst, dass eine Schrift über den *Kulturfaktor Esperanto* auch eine Übersicht zu den damals verfügbaren Lehr- und Wörterbüchern (Paul Christaller) bot, und dazu die damals aktuellen 121 Zeitschriften in und zu Esperanto auflistete.

Was würden wir heute als Themen auflisten und bearbeiten, um über das Esperanto als Kulturfaktor zu berichten? Hier die Liste der Themen, die man vor 108 Jahren im Fokus hatte und daher detailliert darstellte:

- Verbreitung des Esperanto in Deutschland,
- die Literatur des Esperanto,
- Lehrmittel für Esperanto,
- Esperanto-Zeitungen,
- Esperanto und der Handel,
- Esperanto im Dienste der Technik und Industrie,
- Esperanto und Polizei,
- Esperanto im internationalen Post- und Telegraphen-Verkehr,
- Esperanto und die Eisenbahn,
- Esperanto und die Touristik,
- Esperanto und Nationalismus,
- Esperanto und die Akademiker,
- Esperanto kaj juristoj,
- der Student und Esperanto,
- Esperanto und die Jugend,
- virina agado en Esperantujo,
- Esperanto und die Arbeiter,
- Esperanto und Stenographie,
- Esperanto und die Musik,
- Esperanto, der Blinden Hoffnung,
- Esperanto und die Katholiken,
- Esperanto und die Friedensbewegung,
- Esperanto und die Tagespresse,
- Esperanto und die Antialkoholbewegung,
- Esperanto kaj Vegetarismo,

- Universala Esperanto-Asocio,
- Esperanto kaj la Varietataro.

Und zum guten Schluss (wie auch damals am Ende der Festschrift die Liste der Inserenten, die es sich leisten konnten und wollten, dort eine Anzeige zu schalten (soweit ohne Ortsangabe: in Lübeck):

- Esperanta Eldonejo Friedrich Ader in Dresden,
- Ratsweinkeller,
- Cigarren-Import Drefalt,
- Hotel Germania,
- Schabbelhaus (Museum, Weinrestaurant und -Handlung),
- Spethmanns Hotel,
- Hotel Stadt Hamburg,
- Spedition und Dampfschiffsreederei Klingström (warb mit "Korrespondenz in allen Weltsprachen, also auch in Esperanto"),
- Stadttheater-Restaurant,
- Histor. Lokal Zum Deutschen Kaiser,
- Alexandra-Hotel in Berlin,
- Hotel Altdeutscher Hof,
- Karlshof in Berlin (Klublokal der Esperanto-Gesellschaft),
- Waldhalle Schwartau,
- Buchdruckerei und Verlagshandlung Max Schmidt,
- Hoflieferant und Hoftraiteur Otto Maass im Hauptbahnhof ("kalte und warme Speisen zu allen Zügen, Lübecker Rotweine, Zigarren und Marzipan-Versand").

Was mir da beim Ganzen als erstes in den Sinn kam: "ist es ein Wunder, wenn man da von der guten alten Zeit zu träumen beginnt?" – aber auch:

Wer hat denn Lust, aktuelle Daten zu sammeln und dem als Liste gegenüber zu stellen, zu diesen Fragen:

- Anzahl der Mitglieder im D.E.B.,
- Anzahl der Gruppen und deren Mitglieder,
- Anzahl der Lehr- und Wörterbücher (nationale und internationale),
- der Zeitschriften und Zeitungen (gedruckte und/oder "nur" im Netz),
- Themen, die einen Kulturfaktor Esperanto begründen,
- Inserenten (oder mögliche Inserenten) für unsere Verbandszeitschrift oder eine Kongress-Schrift?

... ich bin gespannt, ob sich da einer findet, oder ob wenigstens jemand Hinweise dazu gibt, wo man belastbares Material für eine solche Datensammlung suchen soll ...

**Utho Maier**



# 15-a BIERo

## Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo

### 12. – 14. 4. 2019 en Chotěboř



**M**i vojaĝis aŭte al Prago, pere de petveturo. La kondukisto demandis pri mia celo en Ĉeĥio kaj mi diris 'Ĉoteborŝ'!.. Li: "Ĉoteborŝ, ne, kie ĝi estas?" Mi: "Du kaj duona horo oriente de Prago per trajno." Li: "Ĉoteborŝ, Ĉoteborŝ, ne, ne havas ideon. Kiel vi skribas ĝin?" Mi: "C-H-O-T-Ě-B-O-Ř, Ĉoteborŝ" Li: "Ah, vi volas al Ĥotjeboŝc!"

Tia estis mia unua leciono de la ĉeĥa prononco dum unua parto de vojaĝo al mia unua BIERo. Mi jam venis malfrue kaj maltrafis promenadon tra la urbo kiam mi alvenis en Prago. Post la unua trajno mi malfeliĉe ne trovis mian kajon, pro mia nekompreneo de ĉeĥaj trajnstacioj (se vi estas en la sama situacio, ili havas numerojn por kajo KAJ platformo, kontrolu antaŭe, se vi ne kiel mi volas atendi du pliajn horojn ;) )

Kiam mi alvenis fin-fine je la 23-a en Ĥotjeboŝc, mi tra la mallumo de la bohemia urbo promenis al la ejo, kiu

por la biero estis internuleja lernejo, kie ni povis dormi en la ĉambroj de la lernantoj, kiuj por la semajnfino estis for je siaj familioj. La bieruloj dum mia alveno jam estis en serioza studo, pri la memmiksita citrona likvoro de unu de la partprenantoj. Mi por la duona parto de ĝi gustumis, kaj ankaŭ donis poentojn kaj opiniojn. La variantoj estis diversaj je partoj de citrona ĵeleo, alkoholo kaj acideco.

La mateno komenciĝis bierotipe, kun memorganizita bufedo de la partprenantoj. Poste ni prenis trajnon al apuda urbo. En la stacidomo ni ankoraŭ festis la naskiĝtagon de unu de la partprenantoj, kun kuko kaj ŝaumvino. La programo gvidis nin por rajdi ĉevalojn kaj nutri ilin kaj porkojn en bieno. Poste ni vizitis lokan bierfabrikon, kie ni estis gvidataj tra la proceso de bierfarado, kun sekva gustumado. La reston de la tago ni manĝis, kantis kaj ludis ĝis la noktofin'.



## “La fermita urbo”

“La fermita urbo” estas scienc-fikcia romano de István Nemere el la jaro 1982, eldonita de Hungara Esperanto-Asocio kaj verkita origine en Esperanto.

La ĉefrolulo estas la juna sciencisto Mark Bellor, kiu komencas novan laboron en psikosociologia instituto en Thorlund, en la jaro 2533. En la instituto oni priesploras fermitajn sociojn, ekzemple kosmonaŭtojn en malproksimaj spacbazoj. Sed ankaŭ ekzistas tie la “Adapta Parto”, kie devas loĝi krimfarintoj, kondamnitaj al eterna izolo.

Baldaŭ Mark trovas amikon en sia nova laborejo, la intendanton Erni. Kune ili rimarkas, ke io strangas en la instituto: La energifakturoj estas tro altaj, ofte venas nokte iuj helikopteroj por alporti grandan aron da varoj, pri kiuj neniu havas detalajn informojn, kaj en la apuda arbaro troviĝas granda ŝakto, kiu enhavas aerpumpilon.

Kiam Mark decidis subengrimpi la ŝakton por eltrovi, kio estas tie kaŝita, li malkovris gravan sekreton: Sub la instituto troviĝis fermita urbo, kvazaŭ mezepoka, kun multe da enloĝantoj, kiuj ne sciis, ke ankaŭ ekzistas alia mondo ekstere. Oni uzas tie nur primitivan teknologion, preskaŭ neniu havas sufiĉe da manĝaĵo kaj estas brutaj bataloj inter du grupoj: La kredantoj de la Sankta Cirklo, gvidataj de la Pastro, kaj la soldatoj de la Princo.

Mark estas ŝokita: Kiuj estas tiuj homoj? Kial ili loĝas



subtere en tiu primitiva urbo? Kiel oni povas helpi al ili solvi la konfliktojn? Kaj ĉu la institutestro entute scias, kio okazas sub la instituto?

La lingvostilo de István Nemere estas, kvankam ne tro simpla, facile legebla. La du unue ŝajne neligitaj rakontoj – tiu de Mark kaj tiu de la homoj en la urbo – interesigas la libron, ĉar oni volas eltrovi, kiel ili estas kunligitaj. Tamen jam frue al la leganto estas sufiĉe klare, kiel la okazaĵo progresos, kaj almenaŭ mi neniam estis vere surprizata dum la legado. La problemsolvon je la fino mi estimas tro simpla.


Malgraŭ tio la temoj traktataj – kiel sin kondutas homoj en fermitaj socioj, kion oni rajtas fari al brutaj murdistoj – estas gravaj kaj interesaj.

Entute la romano estas leginda, se ne pro la inspiriga enhavo, des pli pro la signifo de István Nemere por la Esperanto-literaturo. Li skribis 23 originajn verkojn pri diversaj temoj, el kiuj multaj (interalie “La fermita urbo”) estas jam reeldonitaj.

Laŭ mi la verko bone taŭgas por iomete-sed-ne-tro-progresinto de Esperanto. Plejparton de la teksto oni komprenas per kono de bazaj radikoj, kaj eblas lerni kelkajn novajn vortojn, kiuj estas bone aplikeblaj en la ĉiutaga vivo. Kio krome agrabligas la komprenon, estas la fakto, ke nek la frazoj, nek la ĉapitroj, estas tre longaj.

Resume mi rekomendas legi la libron “La fermita urbo”, se oni volas plibonigi sian lingvokonon aŭ legokapablon, aŭ simple por konatiĝi kun grava reprezentanto de la Esperanta beletristiko.

**Bazaj faktoj:** Titolo: “La fermita urbo”.  
Aŭtoro: István Nemere. Eldonejo: Hungara Esperanto-Asocio. Paĝoj: 158.  
ISBN: 3-901752-19-6 **Annika Förster**







La forveturmatenon ni ankoraŭ uzis por festi la naskiĝtagon de la renkontiĝo mem en kafejo, kaj kun grupo de kvin aliaj mi refoje iris al Prago, kie mi prenis buson hejmen. Al ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la



BIERon, [E-mental] (<http://www.e-mental.cz/archiv/12961>) aŭ ties aliajn renkontiĝojn, nepre vizitu ĝian paĝaron kaj pripensu! Ekzemple VIANDO en julio, aŭ se vi volas post SES turismumi en Prago, iru al ĜUPR. Eble vi eĉ akiros ministropostenon ;)

## SeMEO

**Meze de marto mi havis la privilegion partopreni nekutiman Esperantan aranĝon: Esperanto-Semajnon de Tuluzo (mallongigo: SemEO), en Francio, organizitan de la Tuluza Esperanto-Centro.**

**K**ial nekutima? Ĉar SemEO ne luas tranoktejon, ne pagigas kotizon, ne plenigas viajn tagojn per prelegoj. Kaj fakte, ĝi daŭras multe pli ol unu semajnon, kaj ne limigas siajn eventojn al unu loko. Tute kontraŭe, ĝi proponas buntan, libere alireblan programon tra la tuta urbo dum pli ol dek tagoj, dum kiuj estas organizita io interesa por ĉiuspeca Esperanto-ŝatanto. Kadre de SemEO, atingis Tuluzon kaj esperantistoj el la vasta okcitana kaj kataluna regionoj kaj eksterlandanoj. Tamen, ne nur Esperantistoj reprezentas la celon de la eventaro: ĉiu evento rezultigas el kunlaboro inter la Tuluza Esperanto-Centro kaj aliaj instancoj, kiel la universitatoj de Tuluzo, kulturcentroj, lokaj organizoj kaj kvartalaj renkontiĝejoj.

Ene de kelkaj tagoj, mi povis malkovri plurajn kvartalojn de Tuluzo simple partoprenante en la diversspecaj programeroj. Tuj post mia alveno komenciĝis lingva festivalo en universitata centro, kie eksterlandaj studentoj pretigis dekminutajn prezentaĵojn pri siaj denaskaj lingvoj. La tagon poste, mi havis la ŝancon registri epizodon por loka radio en profesia studio. En la intervjuo mi paroladis ĉefe pri la agado de TEJO kaj pri la rolo de junuloj ene de la esperanta movado. Al radioelsendo sekvis entuziasmiga koncerto de La Kompanoj kun kantoj de Jacques Brel tradukitaj al Esperanto, informo-tablo pri la Esperantomovado, promonado tra la historiaj partoj de la urbo, vizito al la Naturhistoria Muzeo kun loka esperantista gvidanto, ateliero pri Vikipedio kaj komuna vespertempo en tipaj manĝejoj kaj trinkejoj. Kompletigis mian viziton unutaga pertrajna ekskurso al apuda urbeto Albi kaj partopreno en la protesto kadre de la “Vendredoj por la Estonteco” kune kun francaj studentoj.

Konklude, frapis min la bunteco de la programo kaj ĉefe de la medio, en kiun vi povas plonĝi partoprenante SemEO. Ne nur Francion, ne nur Esperantujon vi povas malkovri en Tuluzo: Okcitanio kaj okcitan-kataluna kulturo bonvenigos vin kore kun mirindaj pejzaĝoj, manĝoj kaj muziko, el kiuj transpiras la varmeco kaj komplekseco de siaj pluraj identecoj. Aparte mi kaptas la okazon danki la ĉefkunordigantojn de SemEO, Marion kaj Christophe, kaj miajn gastigantojn Rikardon kaj Jeannette. Estis plezuro konatiĝi kun vi!

**Konstanze Schönfeld**



Ne, la bildo **ne** estas el Lörrach, sed el Bazelo. Ni gastigos en la junulargastejo de Lörrach, kaj la sabata ekskurso gvidos nin al la apuda urbo Bazelo (vd la bildon, kvankam – oktobre – ni ne baniĝos en Rejno, promesite !!!)

Krome estas multaj belaj kaj interesaj facetoj, kiuj valorigas vian partoprenon de la seminario.

En la bukeda kurso parolos Thomas Bormann pri sia tempo en Istanbul („Ŝanĝiĝo de malferma socio al aŭtoritate stirita socio en Turkio“). Kaj li tuŝas plian gravan temon, „kiel Stasi observis Esperantistojn en GDR (La danĝeraj lingvo-uzantoj en GDR)“. Pliaj interesaj prelegantoj kaj temoj – inter alie pri vojaĝego per bicikla – atentos vin, detaloj sekvas baldaŭ per nia novaĵletero *bavelo-aktuell*.

Vespere vi povas ĝui kaj miri kaj elprovi viajn sciojn en kvizo pri la vasta bunta mondo de lingvoj kaj poste malstreĉiĝi dum babilado en la knajpo.

### Programskemo

#### vendredo, 18a oktobro

17:00 - 18:00	alveno, aliĝo, ekloĝado, pliaj informoj
18:00 - 19:00	bonvenigo kaj vespermanĝo
19:00 - 20:00	kursoj
ekde 20:15	vespera programo, poste knajpo

#### sabato, 19a oktobro

07:30 - 08:30	matenmanĝo
09:00 - 11:45	kursoj de ĉiuj niveloj
12:00 - 17:00	ekiro al tagmanĝo, poste daŭrigo de la ekskurso al Bazelo, urbogvidado
18:00 - 19:00	vespermanĝo
19:00 - 20:15	kursoj
ekde 20:30	vespera programo, poste knajpo

#### dimanĉo, 20a oktobro

07:30 - 08:30	matenmanĝo
08:30 - 09:00	redono de ĉambroj
09:30 - 11:30	kursoj
12:00 - 13:30	tagmanĝo, adiaŭo

#### Kursoj:

- A komencantoj (Gerold Busch)
- P paroliga (Edmilson Lima Serejo)
- B Bukedo kun diversaj prelego-“floroj” de pluraj prelegantoj (detaloj sekvas)
- i Infanprizorgado por infanoj (2-10-jaraj) (Cornelia Majer, Barbara Bertrand)

#### Kostoj:

Kotizo: 30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Du noktoj en la junulargastejo, ĉiuj manĝoj (\* sabate tagmeze proprakoste ekster la junulargastejo)

en 4-lita ĉambro	70 €
en 2-lita ĉambro	90 € (tre limigita kvanto)

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago sur nia konto:

**BAVELO-Konto** IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22

BIC: SOLADES1VSS (Sparkasse Schwarzwald-Baar)

#### DJH Jugendherberge Lörrach

Steinenweg 40, 79540 Lörrach

(Koordinatoj: 47.6004869 N, 7.6782375 E)

Tel: +49 (0) 7621 47040

jugendherberge-loerrach.de

#### Aliĝilo

(bv. sendi al: [Inge.Simon@esperanto.de](mailto:Inge.Simon@esperanto.de), 07361/ 360 615)

Mi ĝiras \_\_\_\_\_ € al la BAVELO-Konto

IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22 - BIC: SOLADES1VSS .

Mi partoprenas la kurson A / P / B / i .

Mi volas dormi en ...

2-lita ĉambro  ve/sa  sa/di

4-lita ĉambro  ve/sa  sa/di

Mi serĉas pli komfortan tranoktadon kaj petas helpajn informojn pri tio.

#### Manĝoj en la junulargastejo:

Mi volas vegetarajn manĝojn

Mi havas alergion kontraŭ \_\_\_\_\_

Nomo, adreso, tel.n-ro kaj retadreso, subskribo

---

---

---

---

<http://esperanto-bw.de/seminario-eo>



## 41. BAVELO-Seminar 18. - 20. Oktober 2019 – Lörrach

Nein, das Bild zeigt nicht Lörrach, sondern Basel. Zwar ist die DJH Lörrach unsere Bleibe, doch der samstägliche Ausflug führt uns ins benachbarte Basel (s. Bild, doch – es ist Oktober! – werden wir sicher nicht im Rhein baden, versprochen !!!)

Dazu warten viele schöne und interessante Facetten, die die Teilnahme lohnend machen.

Im bukeda kurso sprich Thomas Bormann über seine Korrespondenzzeit in Istanbul („Ŝanĝiĝo de malferma socio al aŭtoritate stirita socio en Turkio“). Und darüber, wie die Stasi in der DDR die Esperantisten überwachte („La danĝeraj lingvo-uzantoj en GDR“). Weitere interessante Vorträge, u.a. über eine Weltreise per Fahrrad, Einzelheiten dazu bald per *bavelo-aktuell*.

Im Abendprogramm können wir bei einem Quiz über die Sprachen der Welt unser Wissen genießen, uns über die Buntheit wundern und anschließend in der *Knajpo* bekakeln.

### Programm

#### Freitag, 18. Oktober

17:00 - 18:00	Ankunft, Zimmerbezug, weitere Informationen
18:00 - 19:00	Willkommen und Abendessen
19:00 - 20:00	Kurse
ekde 20:15	Abendprogramm, danach <i>knajpo</i>

#### Samstag, 19. Oktober

07:30 - 08:30	Frühstück
09:00 - 11:45	Kurse
12:00 - 17:00	Aufbruch zum Mittagessen, danach Ausflug nach Basel mit Stadtführung
18:00 - 19:00	Abendessen
19:00 - 20:15	Kurse
ekde 20:30	Abendprogramm, danach <i>knajpo</i>

#### Sonntag, 20. Oktober

07:30 - 08:30	Frühstück
08:30 - 09:00	Zimmerrückgabe
09:30 - 11:30	Kurse
12:00 - 13:30	Mittagessen und Abschied

### Kursoj:

- A Anfänger (Gerold Busch)
- P paroliga (Edmilson Lima Serejo)
- B Bukedo kun diversaj prelego-“floroj” de pluraj prelegantoj (detaloj sekvas)
- i Kinderbetreuung (2-10 Jahre)  
(Cornelia Majer, Barbara Bertrand)

### Kosten:

Beitrag: 30 € (für alle unter 30: 15 €).  
2 Nächte in der Jugendherberge, alle Essen dort (\* am Samstag Mittagessen außer Haus auf eigene Kosten)  
im 4-Bettzimmer 70 €  
im 2-Bettzimmer 90 € (begrenzt)

Die Anmeldung ist verbindlich nach Eingang der Zahlung auf dem **BAVELO-Konto** IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22  
BIC: SOLADES1VSS (Sparkasse Schwarzwald-Baar)

### DJH Jugendherberge Lörrach

Steinenweg 40, 79540 Lörrach  
(Koordinaten: 47.6004869 N, 7.6782375 E)  
Tel: +49 (0) 7621 47040  
jugendherberge-loerrach.de

### Aliĝilo / Anmeldung

(bitte an: [Inge.Simon@esperanto.de](mailto:Inge.Simon@esperanto.de), 07361/ 360 615)

Ich überweise \_\_\_\_\_ € auf das **BAVELO-Konto**  
**IBAN:** DE21 6945 0065 0010 4179 22 - **BIC:** SOLADES1VSS .

Ich nehme teil am Kurs A / P / B / i .

Ich möchte übernachten im ...

- 2-Bettzimmer  fr/sa  sa/so
- 4-Bettzimmer  fr/sa  sa/so

Ich möchte mit mehr Komfort übernachten und bitte um weitere Hilfe und Info dazu.

### Essen in der Jugendherberge:

- Ich möchte vegetarisches Essen.
- Ich habe eine Allergie gegen \_\_\_\_\_

Name, Adresse, Tel., Email, Unterschrift

---



---



---

<http://esperanto-bw.de/seminario-de>

# 35a PSI Hochspeyer 2019



Fotis kaj arangis Ralf kaj Zoja Haumer